sume from (3) that there really are forty million Esperantists in the world? Far more likely, in my opinion, that the personal qualities that attract a young person to Esperanto have much in common with those qualities that make the same person a good candidate for a Nobel Prize later in life, or that the view of the world that a speaker of Esperanto gains will make that speaker more likely to do work that will lead to a Nobel Prize; maybe Esperanto speakers are twenty times more likely to win a Nobel Prize. On the other hand, with the exception of a few industrialized or otherwise highly evolved countries, in most places the “global” computer network is available only to a few individuals in particular social classes, or—in a few places where there are many Esperantists (e.g. mainland China, Vietnam)—it is not available at all; UEA has members in more than a hundred countries, but only 44 countries are represented in Ederveen’s list (the technically advanced Republic of Korea, with a large and active Esperanto movement, is represented in the list by *one* person; China is represented by none, though one Chinese Esperantist—from Taiwan, with its relatively tiny Esperanto movement!—regularly posts to the Esperanto newsgroup). It seems reasonable to suppose that when the net is available everywhere, and to all social classes, the ratio of Esperanto speakers on the net will be at least somewhat higher than it is now.

All things considered, (3) and (4) seem, again, to neatly bracket that two million figure—and, if we modify the models with a few reasonable assumptions, they will even more closely, and no less neatly, bracket it.

You will hear other figures from other sources. Bernard Golden, an American Esperantist living in Hungary, has published a number of articles over the years in which he debunks (sometimes, in my opinion, over-debunks) the usually *a priori* assumptions that lead to such figures. Esperantists do have a tendency to exaggerate, and often wildly so. Are we alone in this? I think not. When I once tasked Dr. Culbert with the possibility that his Almanac figure for the number of English speakers might be wrong—by the late 1980s it was already widely at variance with the canonical figures being quoted by the press (though it had not

been so a decade earlier)—he simply told me that “English speakers are as prone to exaggerate their successes as Esperantists.” I have heard from one source (second hand), not an Esperantist, that the TOEFL (Test of English as a Foreign Language) given abroad is considerably easier than that given in the United States, so that the figures for people competent in English may be boosted, and also from a second source (first hand) that the test is indeed easier outside this country, though the second individual, an Esperantist, did not attempt to hypothesize a reason for this.

Another example of English exaggeration is Crystal’s widely read and respected *Cambridge Encyclopedia of Languages*. Crystal comes up with a reasonable figure for the number of native speakers of English (he does, after all, have those census results to help him), but then, instead of trying to estimate the number of non-native speakers, in a parallel column he lists the *total population* of countries in which English is official—a total of 1.4 billion persons (he erroneously includes the United States, where English is widespread but not official). The implication, given the context, is (and apparently is meant to be) that there are 1.4 billion speakers of English in the world, and the figure is quoted as such by others (e.g. Peter Stalker in *The New Internationalist*, Jan. 1989); yet, for example, half of this 1.4 billion consists of one nation, India, where at least 90%, and more likely 95-97%, of the population, can’t speak English at all. Others, assuming that Crystal is being conservative, have topped him by quoting figures as high as two billion. Such figures are valid only if we number as English speakers everybody who knows English as well as I know Chinese (i.e. can parrot about ten words, two of them obscene, and two or three rote phrases, and perhaps count to ten and say “dollars”).

My conclusion? The number of speakers of Esperanto today is at least in the middle hundreds of thousands, very likely in the (low) millions. Figures in the tens of thousands should be avoided, as they are wrong. Figures in the tens of millions should be avoided, as they are also wrong.

What are we doing?

The two pages of scanned book covers in this issue were put there for the express purpose of convincing you to buy, buy, buy. If you don’t, you are certainly missing something. But the first of those pages also should serve as a reply to two different arguments that I have seen on the net—one of them related to Esperanto, one not.

In the sci.lang (general discussion of languages) group, one gentleman recently pointed out, quite condescendingly, that although there’s not much else you can do with Esperanto, it does have its place—at Esperanto conferences. This is not an unusual opinion for those who know little or nothing about Esperanto except that it exists.

In the rec.arts.sf.written (science-fiction literary) group, there was a recent argument—it lasted for quite a while—over the question of whether SF is an Anglo-American phenomenon or a global phenomenon. The general opinion seemed to be that SF is a product of the English-speaking world; after some muted cries of protest from the tiny group of people from outside that world who follow the group (and I include some English-speaking Canadians here; most of the Americans in the group seemed to be unaware that a few of their favorite authors, e.g. Crawford Kilian, are not from the United States or Great Britain but from Canada—and that is not even considering a number of Quebecois authors who write in French), it was agreed that, yes, other countries do produce a trickle of SF, most of it consisting of pale imitations of *The Real Thing*, which comes from the United States and Britain.

The *Sferoj* series of science-fiction “almanacs” (more-or-less annual compendia of literature) should put paid to both assumptions. So far there have been nine books in the series; three of them are out of print (but reprints of all three are promised in the near future). Six of the books consist of translations from other languages; three of them are totally made up of science-fiction originally written in Esperanto. Two of the authors are found in both types of volumes: Pekka Virtanen of Finland and István Nemere of Hungary; both apparently write in both Esperanto and their native language (rumor hath it that Nemere, who is also the author of a dozen original novels in Esperanto, is

one of Hungary's more popular authors). Conspicuously lacking (why?) is American Harry Harrison, who has also written in Esperanto as well as English. (Harrison's English-language science-fiction has not been totally ignored by Esperanto translators; his "The Streets of Ashklon" was recently published in Esperanto in Europe.)

You'll see a few American and British names here, and, if you're a science-fiction fan, you'll probably recognize them (some of them you should recognize even if you aren't): Richard McKenna, Naomi Mitchison, Joanna Russ, Robert Silverberg, Harlan Ellison, Isaac Asimov, H.P. Lovecraft (with a second translation of his "The Terrible Old Man", by Karl Pov; the first, by Donald Burleson, appeared in the first ELNA *Literary Supplement* more than a decade ago). But the English-speakers are easily outnumbered, and by works that are often quite different from most American SF. The *Sferoj* series is living proof that science-fiction is not a uniquely Anglo-American phenomenon—and that there is a lot more one can do with Esperanto than simply go to Esperanto conferences.

My recommendations? These books generally follow a general rule for anthologies: collections of "bests" are generally better than original anthologies or "theme" collections. The first type consist of stories selected from among those already published; the editor and translators will already know not only how good they think they are, but how popular they were with their original audience. Original anthologies, on the other hand, lack this selection criterion to work from; and theme anthologies (SF stories about Edsels, for instance) generally narrow the field so far that only a limited number of stories are available to choose from.

If you're not a completist, you would probably want to start with 4, 5, 7 and 9. If you want to see what sort of science-fiction Esperanto speakers write (and are less concerned with quality), you will want 6 and 8. (I emphasize again that any quality deficit in these books has nothing to do either with the language or with the competence of the authors—it is simply that they are the crop, not the cream.) *Sferoj 5*, alone in the series, is a "theme" anthology, but the theme—sci-

ence fiction by women—is sufficiently wide-ranging that there are still plenty of stories available from which to choose the "best". Joanna Russ's "When It Changed", for instance, is considered a seminal classic of U.S. feminist SF.

Miguel Gutiérrez Adúriz of Santander, Spain, the publisher of this series, apparently recognizes that one should distinguish between original and translated anthologies; he has announced that in the future there will be two parallel series of books, one of them carrying on the tradition of anthologizing translated stories, the other for presenting new stories originally written in Esperanto. ELNA will keep you apprised of the development of this new system.

The other page shows a more general collection of literature. Those of you who want to interest your kids in Esperanto should take a look at Heather Amery's large-format picture vocabulary *Mil unuaj vortoj en Esperanto*. I think you should be a dedicated reader (and not just in Esperanto) to sink your teeth into Parfentjev's Dostoevskij translation—I don't remember this being an easy book in English, either. (But perhaps it will be more faithful to the original than the various English translations—I think this may have been the book that Heinlein meant when he stated that the English translation he read was *better* than the Russian original, because it was less depressing). Fans of etymology will want all three volumes of Vilborg's dictionary, which gives a highly detailed account of the source of every official word in Esperanto (as well as, in many cases, the Ido, Occidental and Interlingua equivalents, where those exist—they are not always available in Interlingua); you'll also learn a lot about the roots of the ancestral Indo-European language. The first of Tove Jansson's Moominland books is available again in a much more attractive cover and format than its first appearance; but when, then, can we expect *Comet in Moominland* and the others? Y para los habladores del Español entre nuestros lectores, el libro *El Esperanto: fenómeno de la comunicación* es una traducción de la obra famosa en la lengua Esperanto escrita por William Auld de Escocia, *La fenómeno Esperanto*; un regalo excelente para sus amigos ó familiares, a los cuales Ud. podrá convencer el valor del Espe-

ranto.

Not shown here: the Esperanto translation of *Asterix the Gladiator* by Gosciny and Uderzo. It is on order. Watch this space.

Don Harlow

## Daŭrigata de paĝo 1

- persiste por nia afero. Tio valoras multoble pli ol niaj rektaj pledoj.
- Nobel-premio por ekonomiko estis aljuĝita al nia membro Reinhard Selten. En intervjuoj li ofte, spontane kaj nature, menciis sian esperantistecon.
- Post la seniluziigaj problemoj trafintaj la E-centrojn en Poprad kaj La-Chaux-des-Fonds, kreĝis novaj, espereble sukcesontaj, centroj en Kolombio kaj en Japanio.
- Ne malplej grave: interne de UEA, ni sukcesis fine akurati la aperritmon de la periodaĵoj kaj stabiligi la financon de la Asocio.

Tiuj sukcesoj eble ne estas spektaklaj. Sed spektaklaj sukcesoj okazas nur en vetludejoj kaj borsoj, kaj tiaj sukcesoj povas malaperi same spektakle kiel ili venis.

Tamen, niaj propraj sukcesoj, eĉ se ili ne estas spektaklaj, kapablas nutri iom da freŝa kuraĝo. Ni ne timu preni tiun kuraĝon por daŭrigi nian agadon kaj batalon. Ni konsciu, ke ni laboras por pli justa mondo, por egalrajteco kaj digno sur la kampo de la interhoma komunikado. Ni ne malesperu pro la foro de nia celo, ĉar ĝi ne estas, bedaŭrinde, pli proksima ankaŭ sur aliaj kampoj de la homa aktivado. Ne eblas sukcesi pri Esperanto antaŭ ol sukcesi pri la monda paco, antaŭ ol venki la malsaton kaj elimini gravajn malsanojn. Sed eblas labori por tiuj celoj. Belan okazon donas al ni tiurilate la 50-a datreveno de Unuiĝintaj Nacioj en 1995. Ni festos ĝin interalie per modela asembleo en la kadro de la 80-a Universala Kongreso en Tampere. Ni do laboru fidele kaj konstante por nia idealo. Kiu scias, kiaj novaj sukcesoj atendos nin? Ni havu kuraĝon pensi, ke kelkajn el ili portos al ni la nova jaro 1995.

John Wells

# DANCE SUR ALTA ŜNURO: La Esperanto-Movado inter Idealo kaj Realo

de Mark Fettes

[Mark Fettes, kiu dum kvin jaroj redaktis la revuon Esperanto kaj poste fariĝis redaktanto de Monda Forumo, la revuo de Monda Kunagado, nuntempe estas la Ĝenerala Sekretario de UEA. Per tri gravaj kaj legindaj eseoj, Fettes antaŭ kelkaj jaroj ankaŭ montris sin eble la klarvida el la nuntempaj ideologoj (vidu la kromkadron) de la Esperanto-movado. Unu anglalingva eseo—per kiu Fettes gajnis prestiĝan Maxwell-premion—kontrastigis la Eŭropon de angla hegemonio kontraŭ tiu de Esperanta demokratio. En 1990 li gajnis honoran mencion en la branĉo Eseo de la Belartaj Konkursoj por sia verkaĵo “Demokrateco, neŭtraleco, aŭtonomeco: La ideologia evoluo de Universala Esperanto-Asocio”, kiu titolo sufiĉe klare priskribas la enhavon de la eseo (ĝin legu ĉiu ano de UEA!). Kaj en 1991 li gajnis la premion Luigi Minnaja pro la eseo, kiun ni reproduktas sube, en kiu li priskribas la historion de la dialektiko realismo-idealismo en la Esperanto-movado. La eseo aperis originale en Fonto, sep. 1991, kaj per ĉi tiu reaperigo ni esperas doni al ĝi pli vastaskalan konatiĝon en Norda Ameriko. Legu kaj ĝuu.]

Ekde la komenco, la Esperanto-movado balanciĝas sur ideologia ŝnuro, ĉiam riskante fali suben antaŭ la moko de la mondo. Kio streĉis la ŝnuron? Unufine, la unikeco de la entrepreno. Esperanto ne trovas lokon sur la tero de la naciaj lingvoj, ĉar ĝi ekestis en idealisma reago al ili: al tiu idealo-turo ĝi plu ligas sian ekzistorajton. Sed tiu ekzisto mem implicas alian finon de la ŝnuro, ligitan al la konkreteco de la lingvo, al ĝia efektivo. Nek unu nek la alia el tiuj turoj estas forĝestebla per ideologia sorĉbastono. Pendante inter ili, la movado uzas sian bastonon ne por sorĉi sed por serĉi, por palpi ekvilibron dum ĝi hezite paŝas de sia ekira utopia vizio al la kreota utopia realo.

Tiu ekvilibro estas fragila afero. En unu dimensio ekzistas gravita altiĝo al la frakasa nacilingva grundo, sen kiu la ŝnurdancado mem estus nenecesa, eĉ absurda. Sed ĉi-esee pli okupos nin la ŝnura dimensio: la tensio inter niaj kredoj pri tio, kio *devus* aŭ *povas* esti Esperanto, kaj tio, kio ĝi efektive *estas* kaj *estos*. Multaj aspektoj de la movado fariĝas pli

kompreneblaj, se oni akceptas kaj analizas ĝian surŝnurecon—kvankam ni mem ŝatas paroli, kvazaŭ ni status sur firma tero. Ĉi tiu eseo celas definitive disrompi tiun iluzion. La tuta historio de la movado montras, kiel ŝajnaj “realistoj” povas iluzii kaj “idealistoj” povas pravi, kaj kiel la idealismo de hieraŭ povas fariĝi parto de la realismo de morgaŭ. El tio, cetere, ni ĉerpu ne ĉagrenon sed inspiron. “Kaj kio estis antaŭ tio / Post ĝi ne estas plu la sama...”: kiel en sia majstroverko rekonis Auld, Esperanto mem bazas siajn esperojn sur la mondoŝanga povo de ideo.

Temas do pri provo skizi la fundamentojn de niaj ŝnuro-turoj—t.e. kompreni, kian idealon ni provas realigi kaj kiaj realaĵoj limas la idealon. Tiucele ni rigardos kelkajn etapojn en nia historio el la ŝnurdancista perspektivo. Ne ĉiuj tropoj trompas, nek dialektiko delogas: nia funda metaforo montriĝos fruktodona, se ne kaptos nin vertiĝo.

## 1. La vivigo

Estis kompreneble Zamenhof mem, kiu faris la unuajn necertajn paŝojn sur nia ideo-ŝnuro. “la neefektivegebla utopio”: jam en la “Unua Libro”, direktante sin al homoj ankoraŭ firme sur la nacilingva tero, li konsciis la distancon inter si kaj ili. Kaj lian proponon de solvo ni konas. Se la lingvon samtempe eklernos ne dek homoj sed dek milionoj, eĉ tiuj fortikaj finaj turoj (aŭ finaj muroj) kliniĝos kaj falos, portante kun si tiun timigan ŝnuron kiun la amasoj neniam ekretos. Oni fojfoje ridetas pri tiu revo de Zamenhof, sed nur retrovide. Siatepe ĝi estis inteligenta provo respondi al demando, kiun oni ankoraŭ renkontas: “Kial lerni lingvon, kiun neniu parolas?”

Provo de realismo, do. Kaj jam ĉi tiam, je la komenco de Esperanto, ni vidas kial la realismo povas fiaski. La dek milionoj neniam venis—sed ja venis kuraĝuloj pretaj tuj suprengrimpiti kaj ekpaŝi sen penso al la falo. Fakte la volo “uzi” Esperanton rolis jam dekomence: ĝi estas same praa kiel etikeditaj “parceloj”, kiujn postaj ideologoj svingis tiel trofetriumfe. Kial lerni lingvon, kiun neniu parolas? Pro la defio, la sento esti

pioniro, al simpla beleco de la zamenhofa kreaĵo, la povo kunkrei. Kaj nelonge poste—pro la deziro aparteni, la aldonaj ebloj de komunikado, pro konstante kreskanta kultura kaj informata produktaro. La teorio kaj la efektivo ambaŭ logis kaj tenis, kaj ĝuste en ilia kunekzisto troviĝas la esenco de nia surŝnureco.

En la venontaj sekcioj ni ekzamenos la sekvojn de nia ŝnurdancisteco por la lingvo mem, por ĝiaj parolantoj kaj por la organizaj strukturoj de la movado.

## 2. La evoluigo

Kia lingvo estas Esperanto, kaj kia ĝi estu? Tiel formuliĝas la lingvistika versio de nia baza ŝnurstreĉa demando, kaj la diversecon de la respondoj jam montras nia ĵusa sortimento de proponitaj terminoj. Denove ni ne provu mem elekti starlokon sur la ŝnuro, sed kompreni la fortojn kiuj tenas ĝin.

Esperanto estas elpensita lingvo, kiu fariĝis vivanta. Eble tio jam klarigas parton de la dilemo, kiun frontas lingvistoj, ĉar ambaŭ ecoj daŭre rolas en ĝia evoluo. Tre malmultaj junaj lernantoj de la lingvo konas senpere la Fundamenton, aŭ eĉ la verkaron de Zamenhof; povus ŝajni, do, ke la “vivanteco” de la lingvo jam ludas dominan rolon. Sed tiu opinio ne kalkulas pri tio, kion Probal Daŝgupto nomis “la provo de ĉiu generacio rekonstrui la lingvon sur racie aspektanta bazo”. Oni “scias”, ke Esperanto estas elpensita, ke ĝi havas principe malsamajn celojn ol iu ajn alia lingvo—kaj tiu neforigebla fakto estas potenca muldilo en la mensoj de ĝiaj parolantoj.

Rezultas el tio ne nur la relativa manko de idiomoj kaj aliaj pure lingvaj ecoj, ne detaligitaj ĉi tie sed formantaj centran temon en *La bona lingvo* de Claude Piron. El ĝi fontas ankaŭ konstantaj sociaj fenomenoj, plej unike la “plibonigistoj”, ĉu radikalaj (emaj redizajni Esperanton en novan planlingvon), ĉu pli moderaj (volantaj fiksi pli striktajn, “logikajn” normojn aŭ aldoni novajn elementojn sen aliigi la bazan strukturon). Ofte ili vekas la koleron de malsamopiniantoj, sed fakte, je ĉiutaga nivelo, preskaŭ ĉiu esperantisto estas plibonigisto: la serĉo al

pli elegantaj, pli internaciaj, pli “bonaj” esprimoj estas parto de la Esperanta konversacio. Temas simple pri malsamaj lokoj sur la sama ŝnuro, kies ekzisto mem cetere fiksas limojn: neniu ŝnurdancisto povas movi unu turon, dum li ankoraŭ staras sur la ŝnuro! Same la Esperanta konversacio mem devigas la partoprenantojn akcepti multon kiel neplibonigindan.

Ne nur ĉe la simplaj parolantoj de la lingvo, sed ankaŭ ĉe la plej eminentaj konstateblas la pliboniga tendenco, en modera aŭ drasta formo. *Plena Analiza Gramatiko* kaj *Plena Ilustrita Vortaro* kombinas multajn meritojn sur la kampo de realisma analizo de la lingvo kun abundo da u-formoj (kaŝitaj aŭ eksplicitaj), spegulantaj la preferojn de la kompilintoj. Same la Akademio de Esperanto, taskita per la kontrolado de la lingvouzo, ripete cedis al la tento provi stiri ĝin—kiel en la absurda voĉdono pri la participoj, kiu traktis minoritatan vidpunkton kiel neekzistantan, aŭ la pli nova Norma Listo de Landnomoj, kiu en kelkaj kazoj neglektis kaj la tradicion kaj la aktualan lingvouzon. La absurdeco de tiuj provoj ne rilatas la plibonigemon mem, kiu estas plene esperantista trajto, sed la kredon, ke Esperanto evoluas aŭ povas evolui laŭ desupra modelo. Kiel ni vidis, Zamenhof mem forlasis tiun idealon pro la premo de la faktoj. Antaŭ deko da jaroj Lo Jacomo konkludis en notinda tezo, ke la situacio ne multe ŝanĝiĝis hodiaŭ. Vortaroj, gramatikoj kaj akademioj, kiuj ne agnoskas tiun realon, mem limigas sian eblan influon en la komunumo.

Ni revenu al tiu komuna strebo por “pli bona” lingvo: kion signifas tiu “pli bona” en la pensoj de la esperantistoj? Ankaŭ ĉi tie ni povas distingi inter realisma analizo kaj idealisma. Por la unua oni devus registri kaj analizi la efektivan lingvouzon: profita sed pena laboro, kiun tre malmultaj komencis. Sed la rezultoj ĉiukaze montrus nur tion, kio estas retrovide konstatebla, la historia evoluo: ili ne helpus en la fikso de limoj kaj la farado de elektoj. Kaj la foresto de rigore sciencaj studoj deprenas de ni eĉ tiun helpilon. Restas nur la propraj lingva sperto kaj lingva ideologio.

La du kompreneble interagis. Se fari klasikan kontraston: Kálmán Kalocsay posedis lingvan sperton tre malsaman al tiu de Claude Piron. La kalocaja parnasismo estis rekte inspirita de la eŭropa “alta kulturo” instruita en la

lernejoj kaj universitatoj de lia junaĝo, kaj tiu provizis ankaŭ lian lingvan modelon: skribocentran, sistemigeblan, intelektulan. Kontraste, la pirona konscio pri aliaj trajtoj de Esperanto ŝuldiĝas, laŭ lia propra klarigo, al infanaĝa amikiĝo kun ĉina korespondanto influinta lian tutan postan vivon. Sed temas ne nur pri pure lingva sperto, ĉiudecida: la respondoj al la demando “kio bonas en Esperanto” dependas ankaŭ de tio, kion oni trovas bona en la mondo. Ĉe Kalocsay kaj Piron ambaŭ rolas pli vasta ideologio: ĉu akcepti klasikajn eŭropajn modelojn por tutmonda kunvivado? Iliaj respondoj al tiu demando estas klare malsamaj.

Tutan apartan studon meritis tiu ligo inter socia kaj lingva ideologioj, kune kun ilia influo sur la movadon. Tamen ni povas tre simple skizi la ĉefan Esperantan disdubiĝon. Homoj kun forta kredo pri egaleco apogas lingvon simplan kaj peno-ŝparan; homoj akceptemaj pri la ekzisto de diversaj sociaj kaj kulturaj tavoloj vidas ilian ekeston en Esperanto kiel signon de maturiĝo. Malgraŭ la provoj de tiu tendaro forskribi la alian, ekzistas sufiĉe da pruvoj, ke Esperanto kapablas allogi anojn de ambaŭ: tio plej klare evidentiĝas el la eterna neologisma debato, kun ĝiaj konstante reformulataj tezoj kaj antitezoj. Inter la du flankoj la monda kaj movada evoluo ankoraŭ ne decidis. Kaj iu ajn decido estos—kiel en la kazo de la participoj—nur la decido de plimulto: ĉiam eblos al iu ŝnurdanca solisto, iu Karolo Piĉ, revivigi per brilanta torĉo la malnovan kredon. Ankaŭ tio apartenas al la Esperanta realo.

### 3. La disvastigo

Ĉu Esperanto povas esti akceptata de la mondo, sen ke tiu mondo mem ŝanĝiĝu? Tiu fundamenta demando, kiu kuŝas sub ĉiuj diskutoj pri la rilato inter la esperanistoj kaj la ekstera socio, estis historie unu el la plej distiraj. Ni ĉiuj konas la fruan konflikton inter la etike motivita Zamenhof kaj la pragmataj francaj gvidantoj, same kiel la amaran disiĝon de la internacia movado en neŭtralan kaj laboristan frakciojn, kaj la krucmiliton de Lapenna por apartigi modernan UEA de la verdstelaj revantoj. Nun, en epoko de malpli akraj kontrastoj, ni povas vidi kiel ĉiuj rolantoj tamen troviĝis pendante sur la sama ŝnuro, kiel ĉiuj dispolusigoj fontis el diversaj taksoj

de la idealo kaj praktiko de Esperanto.

Ankaŭ tiu dilemo reiras al la komenco. Eblis, devis eblis, ke unuopuloj lernu kaj ekuzu Esperanton jam en la nuna socio; sed ideo mem de internacia lingvo, ekde la “Unua Libro”, postulas ke ĝi fariĝu socia, kultura, politika faktoro, do potenca perilo de ŝanĝo. En la verkoj de Zamenhof oni konstante retrovas tiun tension. Poemoj kaj paroladoj (tro konataj por bezoni citon) donis al li sendanĝeran okazon por malkaŝi la revolucion, kiun li celis dekomence; en eseoj kaj artikoloj, pli facile atakeblaj, li estis multe pli singarda. Sed ankaŭ tie eblas trovi spurojn de mondoŝanĝa vizio.

Ni limigu nin al unu ŝlosila ekzemplo. La faman eseon de Zamenhof el 1900, “Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia”, oni ofte interpretis kiel lian ĉefan cedon al la francaj “realistoj”—unuavice al la homo, kiu mendis kaj publike prezentis la verkon, Louis de Beaufront. Aperas tie ne korvibrigaj apelacioj al la frateco de la homaro, sed logikega, laŭpaŝa rezonado kiu celas tiri la leganton al unusola konkludo: “Kiel estas sendube, ke post la nokto venas mateno, tiel sendube estas, ke post mallonga aŭ longa batalado Esperanto pli aŭ malpli frue estos enkondukita en komunan uzon por la komunikiĝoj internaciaj.” Kaj tiun konkludon efis generacio post generacio de Esperanto-propagandistoj, eble nekonsciaj, ke ĝia porokaza pozitivisma-determinisma tono komencis radikale eksdatiĝi jam ekde la unua mondmilito.

Tiel do Zamenhof verkis por la debofrontistoj. Sed lia batalada retoriko malkaŝas duan, subtekstan mesaĝon, kiu flusis el lia subkonscio. Se troviĝas tiaj obstakloj, kontraŭ kiuj necesas batali, la mondo mem estas (almenaŭ parte) neracia konstruaĵo plibonigenda, ŝanĝenda. Tra la tuto de “Esenco kaj estonteco”, Zamenhof fakte identigis multajn longdaŭrajn malsanojn de la ekzistanta socia ordo: sufiĉe longdaŭrajn, por ke hodiaŭa leganto miru pri la aktualeco kaj akraĵo en tiuj flaviĝintaj paĝoj. Kaj lia solvo estas radikala. Ĝi kaŝiĝas en du fruaj frazoj: “Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistis la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo... [Sed] en tiu ĉi ‘malfeliĉo’ (kiel nomos ĝin la

naciaj ŝovinistoj) estos kulpa ne la lingvo internacia, sed la aliiĝintaj konvinkoj kaj opinioj de la homoj." Klare tintas tie la sonorilo de la homaranismo, kaj elbrilas la konvinko, ke la menciita batalado de Esperanto estos elemento en aliaj, eble eĉ pli grandaj kaj gravaj bataloj.

Kiel ni scias, Zamenhof neniam rezignis sian mondo-ŝanĝan kredon. Sed nur la formo estis lia persona: aliel vestita, ĝi ludis ĝis hodiaŭ centran rolon en la movado. Ne temas simple pri nebulaj formulita "interna ideo". En pli eksplicitaj versioj ĝin apogis la fondinto de UEA, Hector Hodler, la fondinto de SAT, Lanti, la postmilita ideologo Ivo Lapenna, kaj multaj aliaj pli aŭ malpli konataj aktivuloj. Eĉ ne necesas la ligo al difinitaj personoj: la disfloro de Esperanto en la tuta ŝtat-socialisma orienta Eŭropo (kiel ankaŭ en Ĉinio kaj Kubo) eblis unuavice pro la kunekzisteblo de tiu denaske esperantisma filozofio kun la tegmenta marksisma ideologio. Ne gravas, se teoriuloj foje provis, malsukcese, subordigi la unuan al la dua; sufiĉas noti la komunan kernon de socistruktura kritiko.

Sed ĉi tiu eseo celas loki tiun movadan ideologion sur ŝnuro inter idealo kaj realo, kaj la marksismo, kiel praktika socigvida ideologio, pruvis sin fine fiaska. Ĉu la Esperanta ekvivalento estas do komuna saĝo aŭ kolektiva iluzio? Por la unua argumentas la franca esperantologo Michel Duc Goninaz: laŭ li, la ĝenerala akcepto de Esperanto implicas tiel radikalajn ŝanĝojn en la socio, ke por esperantistoj la sola sencohava strategio estas klopodi por tiuj ŝanĝoj kaj konsideri ilin laboro por Esperanto. Laŭ la konkludo de Duc Goninaz: "La konformistoj, kiuj opinias Esperanton aplikebla al la mondo, en kiuj ili vivas, fiaskis dum unu jarcento kaj

fiaskas plu ĉiutage. Ilia ideologia modelo havas pretan lokon en la rubujo de la Historio."

Plena idealismo, do. Sed jam la fakto, ke Esperanto reale funkcias, devigas ĝin kunekzisti kun sociaj strukturoj, kiuj rekte subfosas aŭ kontraŭas ĉian revolucian spiriton. La vivo trudas la

ofte malklaras, kio estas konformismo kaj kio ne. Duc Goninaz mem rompas lancon kontraŭ "la propagando favore al Unuiĝintaj Nacioj, Unesko k.s. fare de UEA", kvankam el alia perspektivo oni povas rigardi tiujn organojn ĝuste kiel komencajn paŝojn al pli solidara kaj egaleca mondo.

## LINGVA IDEOLOGIO

One of Esperanto's great advantages is the fact that its affix system is so productive. This is obviously true of the official affixes, most of which were carefully defined by Zamenhof more than a century ago. And, despite the vagaries of the European languages from which most of them come, the lesser-known unofficial affixes are also highly productive, despite the fact that their meanings are less well-defined. Good examples of this are the unofficial affixes -OLOG, -OLOGI and -IK.

-OLOG and -IK both mean "science or study of" whatever is in the stem; -OLOG means "a scientist or student of" whatever is in the stem. -OLOG and -IK can be used interchangeably, though actual practice largely leans on the original European usage from which these affixes originate (*matematiko*, *biologio*). However, the ear of the ordinary Esperantist (unlike that of the ordinary Interlingua-ist or Occidentalist, if any such exists) will not be offended by equivalent but non-European terms (*matematologio*, *bitko*), though one can make oneself even more comprehensible, though less hifalutin', by using Esperanto rather than Greek roots ("Vegetologio kaj bestologio estas subfakoj de vivantologio" rather than the more formal "Botaniko kaj zoologio estas subfakoj de biologio").

Mark Fettes has been known to use at least -OLOG and -OLOG consistently in his works ("movadologioj", "organizologio"). Problem for the English-speaking reader is that occasionally our -OLOGY is used not in the sense of a science or study, but of a body of ideas, for which Esperanto has the suffix -AR; and -OLOGUE is used even less consistently. A good example of the first is "mythology," for which the correct Esperanto word can be either *mitologio* (the name of the college class) or *mitaro* (the collection of stories about ancient gods). A very good example of the second is "ideologue," which in English is generally used to refer (pejoratively) to someone pushing a particular brand (often unsavory) of political idea. The Esperanto *ideologo*, which Fettes uses throughout this article, simply means a scientist or student of an idea or group of ideas.

eblon, certe utiligatan, uzi la lingvon por celoj pure pragmataj, ortodoksaj aŭ eĉ reakciaj. Plie, abundas home indaj uzoj de Esperanto, kiuj certe kvalifikeblas konformismaj: ili plibonigas unuopajn vivojn sen tuŝi la fundamentajn problemojn, kaj konsistigas grandegan, eble eĉ la plej gravan parton de la lingva efektivo. Fine, eĉ tiuj, kiuj akceptas la neceson ŝanĝi la socion, sekvas malamajn tamburistojn al sia celo: tial

La pli-malpli reganta kredo al per-Esperanta socia ŝanĝo do ne havas firman bazon: ĝiaj anoj pendas mezaere kiel ĉiuj aliaj. Kaj tio validas ankaŭ por unu el la maloftaj eksplicitaj kontraŭstaroj al ĝi. La tielnomata "raŭmismo", kiu akiris kelkajn anojn kaj pli vastan reputacion pro lerta sinpropagando, pridubis en sia lanĉa manifesto la utilon al la movado de okupiĝo pri mondaj aferoj. Siatempe ĝia celo estis ekvilibriga: reatentigi pri la movada efektivo kaj revalorigi tiujn ekster-ideologiajn uzojn de la lingvo, kiun la reganta retoriko malemfazis. Sed tiu elstarigo de individuaj realaĵoj kondukis ĝin al alia ekstremo. En la deklaro de Giorgio Silfer kaj aliaj sin nomantaj raŭmistoj, percetebblas tendenco nei ĉiujn influojn de tiuj denaskaj idealoj, kiuj ĉe unu fino tenas la Esperantan ŝnuron: la movado estas "mikrosocio" aŭ "memelektita lingva minoritato", la tradiciaj movadaj strukturoj estas laŭdifine

"piramidaj"; "desuprismaj", kaj celas nur "kvantan" varbadon. Al la historia analizo, kun etikedejo de "praceloj" ktp, same mankas ekvilibro kaj detala ekzameno de faktoj. La raŭmismo fakte ŝuldas sian ekziston al la manko de pli seriozaj kaj same sindiskonigemaj movadologioj, kiam la profesiaj reĝisoroj transprenos la kritikan funkcion, ĝi povos modeste retiriĝi de la ŝnuro.

#### 4. La organizo

Ne eblus konkludi eseon pri la Esperanta ŝnurdancado, sen diri ion pri la idealo kaj realo de ties organizaj strukturoj. Ĝuste sur tiu ĉi tereno oni renkontas iujn el la ĉefaj konfuzoj kaj kontraŭdiroj, kiuj ankoraŭ malhelpas la dancistaron en ĝiaj kolektivaj prezentoj.

Esperanto estas persona sperto, kiu dependas de kolektivo por ĝia ekzisto. Multfoje oni atentigis pri la individuismo de la esperantistoj, sed ŝajne malofte oni ligis tion al la unika kvalito de la lingvo: ke oni efektive "alproprigas" ĝin. Esperanto estas persona posedaĵo en maniero nebla por iu ajn alia objekto de socia movado. Sed tiun memstarecon de ĝiaj adeptoj subfosas la socieco de la komunikado, ilia minoritateco en nacilingva maro, kaj nelaste la sociŝanĝaj idealoj, pri kiu temis la lasta sekcio. Ĉiuj ĉi faktoroj pelas la lingvokomunumon al unika grado de organiziteco, kiu liveras multajn fascinajn fenomenojn por studo.

Iuj el la plej fascinaj troviĝas en la evoluo kaj funkciado de Universala Esperanto-Asocio. Lastatempan ideologian skizon pri ĝi oni trovas en ese de Mark Fettes, sed li uzis aliajn kriteriojn ol la nunajn. Nia surŝnura perspektivo komenciĝas de la konstato, ke ekde la komenco UEA respondas al realaj bezonoj en la komunumo—bezonoj ne nur materiaj, kiel eldonado kaj kongresoj, sed ankaŭ spiritaj, pri fokuso de niaj aspiroj al vere tutmonda kunvivado. Organizaĵoj tamen havas sian propran dinamikon, kredaron; ili, pere de siaj gvidantoj, evoluigas bildon pri si mem kiu ne nepre kongruas kun la faktoj. UEA donis frapan ekzemplon pri tio en la krizaj jaroj 1928-1934, kiam ĝi pretendis samtempe gvidi la movadon kaj resti senpere—kaj sole—respondeca al siaj anoj. Dua tia krizo de identeco trovis esprimiĝon en la dramaj komitatkunsidoj de Hamburgo, 1974. Sed, kiel mi aliloke argumentis, Hamburgo ne solvis la kontraŭdirojn en UEA: la posteulo de Lapenna, Humphrey Tonkin, montris sin retorike kaj movadpolitike ties rekta daŭriganto.

Ni ilustru tion per unu konkreta ekzemplo. Frua strategia dokumento el la Tonkina plumo estis "Financa evoluigo: Manlibro pri la Financa Programo de la Esperanto-Movado" (UEA, 1976). Ĝia dua alineo komenciĝas jene: "Necesas

unue konstati, ke, malgraŭ la devizo de UEA 'Unueco estas forto', la Esperanto-movado restas tre diversa, tre pluralisma. En ĝia centro staras UEA..." Sen plu eniri la detalojn de tiu movada bildo, ni povas tuj rekoni la malcertan mikson de realismo en la unua frazo kaj idealismo en la dua. Por havi centron, necesas ke la periferio konsentu esti periferia: kaj ĝuste tiu konsento mankas en la Esperanto-komunumo. Ne devas surprizi nin, ke el la sesdekpaĝa Financa Programo fariĝis preskaŭ nenio ekster la rondo de UEA-intimuloj.

La preskaŭ kompleta ŝanĝo de estraro en UEA en 1989 malfermis la asocion al sinredifino. Sendube estos interese sekvi la novajn formulojn de la asocia kaj movada realo fare de ĝiaj gvidantoj. Sed por tio tamen nun tro fruas. Turnante nin al kelkaj pliaj specoj de organizaĵoj, ni vidas ke memkonceptaj iluzioj perferdis ankaŭ aliajn krom la Universala. En orienta Eŭropo evidentiĝas, kiel kelkaj landaj asocioj neniam ellaboris sendependan bazon por sia agado. Al abundo da fakaj asocioj ĉiam mankis reala piedteno sur la ŝnuro: ili volis ekkuri al grandioza vizio sen unue konstati la firmecon de sia apogo-ŝnuro. Aliaj asocioj, kiel Sennacieca Asocio Tutmonda, malsukcesis adaptiĝi al ŝanĝita realo kaj, forgesante ŝnurdancajn pretendojn, sidas medite sur sia atingita loko. Ilia sorto spegulas en miniaturo la eblan destinon de la movado mem: komunumo kaj kulturo sufiĉe dinamecaj por plu ekzisti, sed tro limigitaj kaj rigidaj por iam fariĝi mondoŝanĝa faktoro.

La dinameco tamen estas fakto. La esperantistoj posedas konstateblan volon al kunagado, kiu en favoraj cirkonstancoj rezultigas organizojn kulture kaj socie riĉigajn. Ni povas trovi esperon en tiuj historiaj kaj nunaj modeloj, celi al ilia diskonigo kaj disvastigo: ĉar, sur tiu ĉi kampo eĉ pli ol aliaj, bezonatas ne nur teorio sed praktiko. Efektive oni foje devas timi, ke la kolektivaj kapabloj de la movado pri memtrompo, realigitaj en unuopaj movaderoj, tute sufiĉas por teni ĝin surŝnure somnambulanta dum preskaŭ senfina periodo.

#### 5. Konkludo

Sed ni denove memorigu nin: Esperanto respondas al reala bezono. Ne en tiu

senco, ke la mondo ne povas vivi sen ĝi; sed en tiu, ke komunikado estas natura emo de la homo, kiun la historia evoluo neniam permesis al ĝi plene evoluigi kaj esprimi. En epoko, kiam la ebloj kaj rimedoj de komunikado eksplode kreskas, la bazo por la funkciado de Esperanto fariĝas pli larĝa ol iam antaŭe. Nia ŝnuro dikiĝas kaj fortikiĝas; ĝi ne plu fortimigas, sed invitas la piedon.

Tiel ŝajnas, almenaŭ, de proksime. Sed la publiko, staranta surtere, gapanta alten, ne nepre perceptos la allogon de tiu fragilaspekta ponto. Por tio necesas, ke pli da homoj grimpu nian turon de la idealo, forlasante sian teran koncepton de la komuni kado. Esperanto dum la videbla estonteco signifos ankaŭ ideologian elekton. Provoj pravigi la lingvon per nuraj pragmataĵoj similas al klopodoj, suspendi altŝnuron ĉe nur unu fino: ĝi restos kuŝanta en la polvo. Realo kaj idealo nur kune tenas ĝin. Inter tiuj turoj, tenante sian ekvilibron per ideologiario ĉiam adaptiĝanta, Esperanto dancas pluen.

#### CITITAJ VERKOJ

Duc Goninaz, Michel. "Formiĝo de ideologiaj modeloj pri la rolo de Esperanto", p. 12-16 en *Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado* (ELBiH, Sarajevo 1988).

Fettes, Mark. "Demokrateco, neŭtraleco, aŭtonomeco: La ideologia evoluo de Universala Esperanto-Asocio", en *Fonto* 121, 9-17.

Lo Jacomo, François. *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto* (doktoriĝa tezo, 1980)

Piron, Claude. *La bona lingvo* (Pro Esperanto/HEA, Vieno/Budapest 1989).

Tonkin, Humphrey. *Financa evoluigo: Manlibro pri la Financa Programo de la Esperanto-Movado* (UEA, Rotterdam 1976).

Zamenhof, L.L. "Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia", p. 268-316 en *Fundamenta Krestomatio* (14a eldono, Esperantista Centra Lihrejo, Paris 1933).



## KUNIKLOJ KAJ SCIUROJ AMIKIGAS ĈE "NAJT"

*de Teodoro Browne*

NAJT (Nord-Amerikana Junulara Tendaro) okazis je la lasta semajnfino de Aŭgusto. Ĝin planis plejparte la junulo Briano Krueger, sed laŭ li la ideo venas de la rusaj samideanoj. Kelkaj plendis pri la dato, tiom proksima al la nova lernejar-jaro; sed vere estis bona ideo, ĉar laŭdire pluvis ofte ĉe la tendumloko, sed la suno brilis sur NAJT. Ĝi okazis en Adirondaka Ŝtatparko, apud la Lago Wakonda kaj la Rivero Schroon.

Via rakontisto (Teodoro) ĉeestis; kaj feliĉe rakontas ke krokodiloj tute ne troveblis ĉe tiu lago, aŭ sur la plaĝo aŭ eĉ la pikniktereno, se ne menciis la tendojn. Jes, tiuj bestoj tute mankis: ni ne krokodilis, eĉ ne en la aŭtoj. Eĉ la muziko estis nur Esperanta. Do oni povas diri ke tiu semajnfino ankaŭ estis Senkrokodila Semajnfino!

Tamen ĉeestis ronĝuloj: sciuroj, tamiatoj, kaj kunikloj. Kelkaj estis la malgrandaj harkovritaj kreaĵoj, sed ni kuniklis kaj sciuris. Mi ekspliku. Du anoj de la antaŭa UConn E-o Klubo, la "Kuniklo-Klubo", alvenis. Ankaŭ alvenis ok kanadanoj, plejparte de Montrealo; kaj oni vendis SCIURI EN MONTREALO-poŝtkartojn kaj "MI SCIURAS" ĉemizojn. Por tiuj, kiuj ne konas tiun idiotismon: estis Esperantisto-Junulara Kunveno ĉe Montrealo, Kebekio, antaŭ du jaroj. La sciuroj en la parkoj estis mirige amikecaj—temis pri tio, ke homoj ofte donas al ili arakidojn, ktp. "Sciuroj kolektas nuksojn ... kaj ni kolektas amikojn", diris la Montrealaj Esperantistoj. Mi kredas ke la plejparto de l' NAJT-anoj kolektis kelkajn amikojn dum tiu semajnfino. Estis mia bonŝanco iri al NAJT kun Briano mem. Nia celo esti la unuaj ĉe la tendumejo malfacileblis pro tio, ke ni "devis" iri unue al Pittsburgh, PA (!) por konduki Jorges (pr. Horhej), Argentina studento al kiu mankis aŭto. Inter Storrs, CT kaj la tendumejo, NY estis mil mejloj kaj 24 horoj de vojaĝo; almenaŭ ni dormis kelkajn horojn ĉe Jorges. Bonŝance Briano havis tutan aron de Esperantaj sonbendoj por aŭskultadi. Briano ĵus alvenis de la San Franciskaj klasoj. La lecionoj estis freŝaj en la menso de tiu junulo.

La "junuloj" kiuj tendumis ne estis ĉiuj de la sama aĝo. Fakte, kelkaj el ni estis

duoble pli aĝaj ol kelkaj aliaj. Sed, kiel diris junulo (Jozefo) tio, kio gravas, estas ke junas la koro. (La plejparto havis inter dudek kaj kvardek jarojn, sed unu estis gimnazia studento. Ankaŭ ĉeestis malgranda knabino, Mira—poliglota filino de alia paro de esperantistoj, kaj duageneracia esperantistino.)

Ĉe NAJT-semajnfino ni tendumis iel kiel aliaj nordamerikaj tendumistoj; krom tio, ke ĉio okazis per Esperanto. (Ankaŭ eble krom tio, ke la plejparto de l' manĝo estis vegetarana.) Ni naĝis en lago, ludis kartojn, rapidmarŝis monteten, piknikumis, kuiris blankajn bonbonojn super ligno-fajro, kantis, rakontis historiojn, ktp. (Kaj nur tiuj, kiuj ĉeestis, povas memori la kuniklo-sciuran amikeco-vesperon!?)

—SNEES Bulteno  
aŭtuno 1994

## USEJaj Delegitoj ĉe la Modela U.N.a Estreca Kunveno

*de Daniel Cuthbert kaj Lael Tolley*

Antaŭ ne longa tempo, la UNA-USA invitis reprezentantojn de USEJ ĉeesti la Modelan U.N.an Estreca Kunvenon ĉe Sarah Lawrence College de la 25a ĝis la 26a de junio. Amnesty International, World Federalist Federation, Youth Democratic Alliance, kaj aliaj, ĉiuj partoprenis en la kunveno. Iu grupo havis sian mesaĝon. La Modelaj U.N.aj lekcionoj diskutis la organizadon, buĝetigadon, estrecon, intertraktadon, diplomation, kaj petskribadon. La plej grava subjekto estis la jubileo de la kvindekaj jaroj de la establado de la Unuiĝintaj Nacioj en 1995.

Por la delegitoj de USEJ, la kunveno donis la ŝancon por sciigi la aliajn delegitojn pri la esteco de la Esperanto-Movado, specife la junula fakto (USEJ). Ni disdonis kopiojn de la poŝtkurso kaj la grupoj de delegitoj donis al ni siajn ideojn por fortigi kaj plibonigi nian kaŭzon. Ĉar la Modela U.N. fundamentis sur organizado, ili sugestis fortan komunikadon inter junulaj fakoj en hierarkia maniero, simila al la sistemo de U.N. Ĝenerala Sekretario kaj ties subuloj.

Por la juna junula movado, tiu ĉi kunveno estis lerna sperto, kaj esperplene USEJ uzas la lecionojn en sia kreskado.

## AŬTUNA RENKONTIGO ESPERANTISTA

*de Peter de Groot kaj Shannon  
Wong-Ken*

Dum la semajnfino de la 8a - 10a de oktobro okazis tre sukcesa renkontiĝo de esperantistoj el nia regiono. Kvindek partoprenantoj alvenis el Novanglio, Novjorkio, Ontario, Kebekio kaj aliaj landoj, inkluzive Brition! Ni povis partopreni en la tuta semajnfino kaj tre ĝuis la amikan etoson. Ankaŭ ni rapidas diri ke la loko estis perfekta, kaj la kolorfolia vermonta pejzaĝo estis belega. Ĉi tio estis la unua granda kunveno de esperantistoj kiun ni spertis. Pri niaj impresoj ni devas unue diri ke preskaŭ ĉiu klopodis paroli la lingvon dum la tuta afero, nur kelkaj usonaj vizitantoj emas krokodili angle. Krom tio ni vere havis la impreson ke la lingvo plenumis la promeson de intemacia komunikilo. Fakte, la Kebekianoj ne ĉiuj regas la anglan, do komunan lingvon ni bezonis! La partopreno de Marjorie Boulton, fama verkistino, montris kian plezuron la beletra aspekto de la lingvo povas havigi al seriozaj studentoj. Ŝi parolis ekzemple pri la granda literatura heredaĵo de Zamenhof, kiu esperante tradukis milojn da paĝoj da klasikaj verkoj el ses lingvoj. En aliaj prelegoj, ŝi parolis pri la graveco de la lemado de la lingvo, ne nur por komencantoj, sed ankaŭ por progresantoj, kiuj ofte atingas ne tre altan nivelon kaj ŝajnas tre kontentaj tie. Pri tio ni povas komenti ke preskaŭ ĉiu fuŝis iam kaj iam la akuzativon! Do komencantoj, ne timu la gramatikon, eĉ spertaj esperantistoj eraras kelkfoje. Kaj ankaŭ ne forgesu, ke valoras la penon plibonigi nian kapablecon kaj tiele amplifiki la grandan plezuron kiun ni spertis kiam ni babilas esperante ĝuste. Norrmand Fleury, Zdravka Metz kaj la Montreala grupo organizis la renkontiĝon, kaj grande kontribuis al ĝia sukceso. Al ili ni ŝuldas grandan dankon, kaj ni esperas renkontiĝi denove la venontan jaron!

—SNEES Bulteno  
aŭtuno 1994

Arnold Langberg raportas pri la venontjara renkontiĝo: "La 1995-a A.R.E. okazos de la 7-a ĝis la 9-a de oktobro. Aperos pli da detaloj en la decembra *Verda Lumo*, inkuzive de nia planada tabelo."

## HOW LONG DOES IT TAKE TO LEARN ESPERANTO?

